


# HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



Lokomotivoj ekde la plej malnova ĝis la plej moderna

1

----- 63-a jarkolekto  
2019



# HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado  
en Hungario

Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapest

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000

al eksterlanda adreso: EUR 12

\*

## MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok

központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

ISSN 0230-323x

## ENHAVTABELO:

- |                 |                                   |
|-----------------|-----------------------------------|
| 2. I. Gulyás:   | Historio                          |
| 3. I. Gulyás:   | Interesaĵoj pri la IFEF-kongresoj |
| 5. L. Gabalda:  | La 4-a LUMINESK'                  |
| 6. J. Tomíšek   | El fervoja mondo                  |
| 9. L. Gabalda:L | La 85-a Itala kongreso            |
| 11. L. Gabalda: | La 26-a Internacia E-Semajno      |
| 13. I. Gulyás:  | Gravaj tagoj                      |
| 15. HFEA:       | Nekrologo (Éva Farkas-Tatár.)     |
| 18. L. Gabalda: | Trajnvojaĝo en Barato             |

63-a jaro N-ro 1, JANUARO - MARTO

## HISTORIO

En la pasinta jaro mia plej grava tasko estis por pretigi historion pri la hungara fervojista Esperanto-movado. Antaŭ kelkaj jaroj – kiam ankoraŭ vivis mia plej bona amiko János Patay – jam ni komune komencis skribi tiun historion, sed pro lia morto tiu laboro haltis. Por daŭrigi la pretigon de la historio mi devis akiri kaj tralegi multegajn verkitajn materialojn, artikolojn de nia faka revuo HFM kaj aliajn konojn. Vere tio estis granda okupado en la tuta jaro. Mi trarigardis nenombreblajn fotojn, kaj mi klopodis elekti la plej taŭgajn bildojn al la teksto.

Kiam mi elektis la fotojn, mi estis ege envia, ĉar mi vidis, ke en la 1960-80-aj jaroj en la ĝenerala kunsido de la Hungaria Esperanto-Asocio partoprenis plurcent esperantistoj, inter ili plurdek fervojistoj. Nuntempe en samaj kunsidoj partoprenas nur 15-20 esperantistoj, inter ili 3-4 fervojistoj.

En la kadro de la fervojistaj klubkunvenoj ĉiam estis plenplenaj la granda halo en la Sindikata rezidejo de fervojistoj, kie ni senpage ricevis lokon por kunveni kaj agadi. Dum longaj jardekoj tiu klubo estis fama eĉ eksterlande, ja ĝi daŭre havis altnivelajn programojn, altrangaj personoj prelegis, ekz. D-ro Kálmán Kalocsay, Julio Baghy, Lajos Kökény, Alfonz Pechan, István Bácskai, krome multaj eksterlandaj famuloj, ekz. W. Bormann el Germanio, Petro Poliščuk el Uzbekio, eĉ la prezidanto de UEA Ivo Lapenna, la ĝenerala sekretariino de UEA D-rino Flóra Szabó Felső kaj multaj ceteraj. Nuntempe jam ne funkcias fervojista Esperanto-klubo en Budapeŝto.

Pretigante la „Historion” mi nur povas esperi, ke en la estonto la Esperanto-movado vigliĝos kaj larĝiĝos ne nur ĉe la fervojistoj, sed en nia tuta lando eĉ mondo. Finfine la „Historio” pretiĝis en la fino de la pasinta jaro, kaj en la presejo oni jam presis tiun.

István Gulyás

## **INTERESAĴOJ PRI LA IFEF-KONGRESOJ OKAZINTAJ EN HUNGARIO**

En Hungario entute okazis kvin IFEF-kongresoj. Ĉiuj kongresoj havis iujn interesaĵojn, pri kiuj kelkajn mi prezentas.

La **14-a kongreso** de IFEF en 1962 okazis en Budapeŝto. Estis grava, ke la LKK-anoj kaj la helpantoj havis grandan zorgon kaj neimageble multan laboron, ĉar la kongreso estis planita por 500-600 partoprenantoj, sed fakte aliĝis 1061 el 20 landoj, kaj partoprenis 1004 esperantistoj el 17 landoj.

Estis grava rezulto, ke por bone prepari kaj helpi la aranĝadon de la 14-a kongreso la hungaraj fervojistaj esperantistoj akiris deĵorliberiĝon je 15 tagoj por pli ol 60 gekolegoj kiel helpantoj, kaj tutan monaton por la ok LKK-membroj. Estis bezonata tiel multaj helpantoj, ja en ĉiuj fervojaj limstacioj, en la budapeŝtaj fervojaj stacioj, en la flughaveno devis atendi, saluti kaj informi la partoprenantojn de la kongreso kiam ili alvenis, eĉ ankaŭ tiam, kiam ili forveturis el Hungario.

La alia grava rezulto estis, ke la ĉefprotektanto de la 14-a kongreso estis la ministro de trafiko kaj poŝto, István Kossa jam antaŭe delonge esperantisto, kiu persone kontrolis la lingvan evoluon de la LKK-anoj kaj helpantoj en la kadro de la preparlaboro eĉ ankaŭ dum la kongreso. Li multfoje partoprenis dum la kongresa semajno en la programoj de la kongreso. Pliaj protektantoj estis la Fervojista Sindikato, la Ĝenerala Direkcio de Hungaraj Ŝtatfervojoj (MÁV) kaj pluraj regionaj fervojdirekcioj.

Ankaŭ estis bona afero, ke dum la kongreso okazis du tuttagaj ekskursoj. La unua okazis tra Miskolc al la groto Aggtelek, kie estis unike interesa koncerto de Simfonia Orkestro de MÁV, kaj lokigo de marmortabulo sur la muro ene de la groto. La alia ekskurso okazis al la lago Balatono, kie ni vizitis la urbon Balatonfüred, poste okazis ŝipekskurso al la suda bordo de la lago, kie ni vizitis la urbon Siófok, kaj tie donis altnivelan akcepton la ministro por ĉiuj partoprenantoj. Ambaŭ tuttagaj ekskursoj okazis per specialaj trajnoj kaj parte per specialaj busoj.

Fine mi mencias, ke la prezidanto de IFEF konstatis, ke tiu kongreso fariĝis „**Kongreso de la Entuziasmo**”.

La sekva **34-a kongreso** de IFEF okazis en 1982 en Hungario en la apudbalatona urbo Balatonfüred. Partoprenis 605 kongresanoj el 23 landoj.

Unika estis, ke la estraranoj kaj komitatanoj de IFEF eĉ multaj eksterlandaj movadanoj kun familianoj ricevis senpagan, unuklasan fervojbileton de MÁV. Per tiu bileto ili povis dum la tuta kongressemajno eĉ poste dum unu monato senpage veturi per trajno en Hungario.

Estis interesa iniciato flanke de la LKK de ĉi tiu kongreso, ke propagandcele unu junulo – sub 30 jaraĝoj – de ĉiu lando senpage rajtas partopreni la tutan kongreson – inkluzive tranoktadon, provizadon, ekskursojn – por allogi gejunulojn al la movado. Bedaŭrinde entute 4 junuloj pretendis tiun eblecon (Danio, Jugoslavio, Hungario).

La prezidanto de IFEF anoncis, ke la kongreso meritis la titolon: „**Kongreso de Bonkoreco**”.

La **47-a kongreso** de IFEF okazis en 1995 en la urbo Pécs, kie partoprenis 327 fervojistaj esperantistoj el 23 landoj.

Krom la oficialaj programoj (inaŭguro, komitatkunsidoj, fakaj kunsidoj kaj prelegoj ktp) okazis – en la kadro de la kulturaj programoj - belega orgenkoncerto en la Baziliko, koncerto de la Blovorkestro de MÁV, dancensemblo kun multaj geaktorj ktp.

Dum la tuttaga ekskurso la partoprenantoj vizitis la faman vinberregionon Villány kaj la Historian Memorlokon pri batalo kontraŭ turkoj en 1526.

Ankaŭ estis interesa la postkongreso, en kies kadro la 60 partoprenantoj per speciala buso traveturis Hungarion de Pécs tra Kalocsa, Kecskemét, Bugac, Budapeŝto, Szentendre ĝis Visegrád.

La prezidanto de IFEF konstatis, ke la 47-a kongreso de IFEF plenumis sian celon, kaj fariĝis: „**Kongreso de la Komprenemo**”.

La **52-a kongreso** de IFEF okazis denove en Budapeŝto en la jaro 2000. Tie partoprenis 277 esperantistoj el 22 landoj.

Estis novaĵo, ke la LKK-prezidanto anoncis en la inaŭguro, ke ĉiuj programeroj komenciĝas akurate, kaj tiun promeson konsekvence plenumis la organizantoj. Pro tio okazis kelkaj problemoj, ĉar kelkaj kongresanoj malfruis la ekskurson, kaj ili plendis pro tio. Estis interesa, ke ekde la dua tago de la kongreso jam neniu malfruis.

La tuttaga ekskurso okazis en la urbo Eger, kien speciala trajno kunportis nin (kaj ĝi atendis nin en la stacidomo Eger por transporti la partoprenantojn al Budapeŝto post la fino de la ekskurso). La ekskursantoj vizitis la urbon, la universitaton, la fortikaĵon, kaj en eleganta vinkelo ili tagmanĝis kaj gustumis delikatan vinon kun cigana muziko.

La duontaga ekskurso kondukis nin al la budapeŝta „Infanfervojo”, kaj per speciala trajno ni veturis tra la montaro Buda al la supra stacio.

La kongreso ricevis la baptonomon: „**Kongreso de Akurateco**”.

La **56-a kongreso** de IFEF okazis en la apudlima urbo Sopron en 2005, kie partoprenis 205 kongresanoj el 21 landoj. La kongreson ni organizis komune kun la aŭstraj fervojistaj esperantistoj. Pro tio kaj en la LKK kaj inter la helpantoj partoprenis aŭstroj.

La tuttaga ekskurso kondukis nin al la lago Balatono, kie ni vizitis la belegan kastelon Festetics en la urbo Keszthely, en Badacsony ni gustumis la faman bonkvalitan vinon, rapide ni vizitis la kuracbanlokon Hévíz.

La komunaj kulturaj programoj ankaŭ donis neforgeseblajn travivaĵojn al la kongresanoj, ĉefe la komunaj dancoj kaj kantoj.

Ankaŭ estis interesa, ke la duontaga ekskurso okazis en la ĉarma aŭstra urbo Eisenstadt, kie ni vizitis la mondfaman kastelon Eszterházy, la preĝejon „Bergkirche”, kie estis entombigita Josef Haydn. Poste gastigis ĉiun partoprenanton la urbestro de la urbo. Dum la alia duontaga ekskurso ni vizitis la lokon de la iama „Páneŭropa Pikniko, kie en jaro 1989 la hungaroj malfermis la landlimon, kaj 10-15 mil personoj – interalie multaj civitanoj de la tiama GDR – libere povis trapaŝi la landlimon al Aŭstrio.

Tiu kongreso estis dulanda, ĉiurilate internacia. Dum la preparlaboro kaj dum la kongreso ni bone povis kunlabori kun la aŭstroj, pro tio la prezidanto de IFEF kvalifikis la kongreson: „**Kongreso de la Amikeco**”.

Kompreneble mi povus vicigi la aliajn interesaĵojn pri la IFEF-kongresoj okazintaj en Hungario, sed momente tio estas sufiĉa.

István Gulyás

## La 4-a LUMINESK' en Königswinter (27.12.2018- 3.1.2019)

La jarfina aranĝo okazis en Germanio en la JUFA-hotelo proksime al la urbo *Bonn*. Partoprenis ĝin 65 geesperantistoj el dek landoj, inter kiuj ankaŭ estrarano kaj ĝenerala direktoro de UEA. Sabate vespere okazis interkonatiĝo en amika etoso kun gustumado de du lokaj vinoj - blanka kaj ruĝa.



*Liba kaj Floreal Gabalda*

Dum la semajno ni aŭskultis diversajn interesajn prelegojn. De Yoshie kaj Dieter Kleemann ni eksciis pri la insulo *Shikoku* kaj pri tradicioj rilate al la 9-a simfonio de Beethoven. De Christiane Oeter ni lernis kiel vivi sen kuirilo kaj ni povis gustumi kelkajn ŝiajn vegetarajn ellaboraĵojn.

Rakoen Maertens prelegis pri sia agado en UNESKO kaj UN parolante pri falsaj novaĵoj, misinformo, propagando kaj pri aliaj interesaĵoj. Li ankaŭ prezentis al ni Unesko-kurieron. Yves Nevelsteen parolis pri novaj vortoj en Esperanto, pri Esperantaj markonomoj en Benelukso

kaj pri bitlibroj kaj bitrevuoj. Dima Ŝevĉenko prezentis sociajn retejojn kaj Esperanton. Kun Anna Striganova ili parolis pri la revuo Esperanto, kiun ili redaktas kaj pri ilia eldonejo "Impeto". Sur tabloj estis instalitaj libroservoj de FEL kaj de Impeto. Dieter Rooke parolis pri la historio de la Esperanto-literaturo kaj gvidis la internacian ĥoron. Kristin Tytgat gvidis paroligan kurson. Okazis kvizo por la plej saĝa homo. Venis ankaŭ ĵurnalistoj por intervjuo.

Temoj de Wera Blanke estis: "Publike paroli - kiel efike interkomunikiĝi" kaj "Kiel traduki *Maulstasche* - terminologiaj konsideroj pri regiona specialaĵo". Anna Striganova prelegis pri: "Dronitaj urboj - fabelaj kaj realaj" kaj pri: "Kial nun modas antagonisto?" Vladimir Rodin konigis al ni la historion de la plejlonga transsiberia fervojo. Barbara Branderburg parolis pri la nova biblioteko de GEA. Ŝi ankaŭ organizis "La Majstrokuiristo ĉe Luminesk". Tri kandidatoj prezentis sin post la konkurso. Rudolf Fischer okupiĝis pri ŝercoj. Amri Wandel parolis pri turismado en Israelo kaj Jordanio, invitis la ĉeestantojn al la venontjara Israela kongreso, prezentis la nombron de Esperanto-parolantoj en la mondo kaj parolis pri akvo-ekologio de la Ruĝa al la Morta maro. Bernard-Régis Larue interese rakontis pri la unuaj temploj kaj pri la pordo de la Edena ĝardeno. Ulrich Brandenburg prezentis bildojn pri Finnlando por instigi la partoprenantojn al la venonta UK en Lahti. Ni havis la plezuron gustumi kelkajn manĝaĵetojn preparitajn de lia edzino kaj tipan brandon. Iuj prelegoj estis enkadre de la Internacia Vintra Universitato (IVU) kaj, ĉe la fino, AIS-atestiloj estis transdonitaj al la sukcesintoj de la ekzameno.

La Silvestra vespero komenciĝis per festa manĝo kaj la balo estis inaŭgurita per polonezo. Dancadon oni interrompis noktomeze por bonvenigi la Novan Jaron. La 1-an de januaro grupo da partoprenantoj promenis en la naturo. Dum la renkontiĝo okazis du tuttagaj ekskursoj: la unua gvidis nin al la monto *Petersberg*, kie ni povis trarigardi la faman hotelon, kie en la pasinteco loĝis multaj gastoj de la registraro, kaj kie estis subskribitaj gravaj kontraktoj. En la apuda urbo *Röhdorf* ni havis eblon enrigardi la



*Partoprenantoj de la 4-a Luminesk'*

iaman domon de la germana kanceliero Adenauer. La ekskurso finiĝis en la vinmuzeo de la urbeto *Mayschoss*, kie ni trarigardis la vinkelon kaj poste gustumis kvar diversajn vinojn de la regiono.

La dua tuttaga ekskurso ebligis al ni ekkoni kelkajn lokojn en la universitata urbo *Bonn*. Unue ni vizitis la muzeon pri historio de Okcidenta kaj Orienta Germanioj, iliaj evoluoj de post la milita epoko ĝis hodiaŭ. Bona tagmanĝo atendis nin en historia restoracio apud la tre bela malnova

urbodomo. Posttagmeze ni vizitis la iaman naskiĝdomon de la mondkonata komponisto Ludwig van Beethoven. Restis iom da tempo por promeni tra la placo.

Ĉiuvespere, post la oficiala programo, en "gufujo" okazis varia aldona programero kiun lerte prizorgis gesinjoroj Kleemann. Por adiaŭa vespero ili preparis krimludon. Ni ankaŭ ĝuis rakonton el Aŭstralio, poemojn kaj fabelojn, ŝercojn kaj peĉakuĉon (prezentado de 20 bildoj prikomentataj nur po 20 sekundojn). Unu vespero estis dediĉita al la forpasinta Hans-Dieter Platz (alinome HDP). Omaĝe al li estis montritaj diversaj bildoj el pluraj Internaciaj festivaloj, kiujn li sukcese aranĝadis dum tri jardekoj en diversaj lokoj de Germanio.

Ni partoprenis Luminesk' la unuan fojon. Al agraba aranĝo ni invitas vin partopreni jarfine. Organizas ĝin Germana Esperanto Asocio (GEA). Dankon pro amiketosa semajno kaj bona organizado.

**Liba Gabalda**

## El fervoja mondo

Aŭstralio: **Unua tute aŭtomata vartrajno**

En maldense homloĝata regiono *Pilbara*, en okcidenta Aŭstralio, en oktobro 2017 okazis la unua kontinue aŭtomata trajngvidado de vartrajno sur kontinento sen lokomotivestro. La vartrajno trafikis sur fervoja linio 100 km longa el fervoja stacio *Wornbat Junction* al stacio *Paraburdoo* kaj estis kontrolita de la trakreĝejo centra porlinia en *Perth*. La fervojlinio apartenas al mineja kompanio *Rio Tinto*, kiu priservas fervojan reton *Hammersley and Robe Railway* kun entuta longo 1700 km, kiu finas en havenoj *Dampier* kaj *Port Walcott*. La provveturo de la aŭtomate trajngvidata vartrajno estis komenco de preparoj, kaj ĝis fino de la pasinta jaro 2018 estis enkondukita tute aŭtomatigita trafikado de vartrajnoj sur la linio. Celo de la kompanio estas fariĝi unua en la mondo kun tute aŭtomata trajngvidado de vartrajnoj. Teleregadan sistemon por direktado de vartrafiko liveris la kompanio *Ansaldo STS*.

*(Laŭ LOK Magazin)*

Eŭropa Unio – Hispanio: **Ĉefoj CER kaj UIC kunsidis en Madrido**

Laŭ invito de Hispanaj Fervojoj (*RENFE*) en la tagoj 7-a kaj 8-a marto 2018 en Madrido okazis kunveno de t.n. *High Level Passenger Meeting*. Temis pri renkontiĝo de ĉefoj de la eŭropaj fervojaj entreprenoj en sfero de pasaĝera trafiko. La traktado okazis laŭ invito de Hispanaj Fervojoj (*RENFE*), organizantoj estis ambaŭ ĉefaj eŭropaj fervojaj organizoj – Komunumo de Eŭropaj Fervojoj (*CER*) kaj Internacia Fervojunio (*UIC*).

Ĉefoj de elstaraj eŭropaj trafikistoj traktis pri malfermado de merkato EU kaj liberaligo de fervoja trafiko, kaj ĉiuj delegacioj interŝanĝis spertojn en tiu ĉi sfero. Multaj delegacioj uzis la platformon ankaŭ al individuaj traktadoj kun trafikistoj de aliaj landoj, ekzemple delegacio ĈD traktis kun trafikistoj el Slovakio (ZSSK), Aŭstrio (ÖBB) kaj Svisio (SBB), kaj ankaŭ kun direktoroj UIC (J.P. Loubinoux) kaj CER (Libor Lochman). Ĉefoj de eŭropaj trafikistoj koncentriĝas ankaŭ por gravaj alvokoj en sfero de disponigado de kvalitaj servoj por vojaĝantoj.

Eŭropa Unio:                   **Gitaraj kordoj malaltigu bruon de trajnoj**

Kvankam gitaraj kordoj kaj reltrafiko unuavide havas nenion komunan, fakte ili inspiris konatan konzernon *Semperit* al uzo de ilia kvalito kiel speciala plasta intermetaĵo inter ŝpaloj kaj reloj kun celo redukti bruon de traveturantaj trajnoj. *“Internacia konzerno por produktado de plastaj artefaritaj produktoj kun sidejo en Vieno inspiris sin per kvalito de kordoj kaj evoluigis intermetaĵon, kiu optimumigas ŝpalojn, ke ili ne perdu originajn kvalitojn, kaj tamen malaltigu bruon”*, klarigis *Reza Beglari*, ĉefo de renovigoj *Semperit* en tagjurnalo *Der Standard* en februaro 2018.

Uzita materialo pruvis, ke tiu ĉi novaĵo retenas ne nur varmon kaj malvarmon, sed ankaŭ bruon, ĝi do estas uzebla ankaŭ en kontraŭbruaĵaj vandoj laŭlonge de la fervojlinioj. *“Unu el la plej gravaj alvokoj dum evoluo estis ŝarĝtestadoj, ĉar intermetaĵo devas elteni dek ĝis dudek jarojn, kaj do ankaŭ ŝarĝon 400 milionojn da tunoj”*, indikis krom alia *Beglari*. Longa daŭro de uzebleco estas laŭ li principa, ĉar interŝanĝo estas tre renovigokosta. *“Testadaj fazoj por malpli bruaj reloj devis okazadi en realaj kondiĉoj”*, li aldonis.

Kvankam *Semperit* sur sia bieno havas testadan provlinion, por reala ekzamenprovado estis bezonata transiro al kurante uzata trafiklinio. Pli ol du jarojn mezurado de bruoj estis ekzamenata sur itinero 500 metroj longa. Momente la nova intermetaĵo inter ŝpaloj kaj reloj estas testada sur linioj de belgaj fervojoj. Celoj estas ekfunkciigo de la novaĵo ankaŭ sur aŭstra kaj germana merkatoj en la jaro 2018, akcentis *Beglari* kun tio, ke traktado inter Aŭstra Federacia Fervojo (ÖBB) kaj *Deutsche Bahn* (Germana Fervojo) jam okazas. Problemo tamen estas momentaj ekonomiaj malfaciloj de la konzerno *Semperit*, kies ĉefo *Martin Füllenbach* antaŭnelonge anoncis bazan restrukturigon por ĉiuj divizioj. *“Kiel ĉi tiuj ŝanĝoj tuŝos ankaŭ divizion Semperit, praktikanta pli alte priskribatan evoluon, ne eblas en tiu ĉi momento taksii”*, proklamis parolantino de la konzerno *Monika Riedel*. *Füllenbach* ja eĉ anoncis por pripensu vendon de la tuta ĉi tiu divizio, atentigis *Der Standard*.

Germanio:                   **Longdistancaj trajnoj en 2017 trafikis kun ĝisnuna plej alta kargiteco**

Longdistancaj pasaĝertrajnoj *ICE Deutsche Bahn* (Germanaj Fervojoj) atingis en la jaro 2017 la plej altan kargitecon dum longaj jaroj, informis ĉefo de la konzerno *Richard Lutz*. En la jaro 2017 estis floto de trajnoj *ICE*, konsistanta el ĉirkaŭ 260 trajnoj, okupata per rekordaj 58,5%, tio estas pli je 3 procentoj, ol en la jaro 2016, diris laŭ ĵurnalo *Handelsblatt* de la 23-a januaro 2018 *Lutz*. Tiun ĉi rezulton atingis la longdistancaj trajnkunligoj *ICE* malgraŭ malfavora vetero, kiu kaŭzis portempajn teknikajn malfacilaĵojn kaj malfruiĝojn. Ekzemple ĉe fervojkunligoj inter *Berlino* kaj *Rheinlando*, kaj *Köln a.R.- Frankfurt am Main* rezulto estis laŭ tiu ĉi indikilo eĉ pli favora. Ankaŭ trajnkunligoj sur nova grandrapida fervojlinio *Berlino – Munkeno*, malfermita en decembro 2017, helpis plialtigi nombron de vojaĝantoj sur tiu ĉi trajntraseo horara al 3,6 milionoj. Malpli multaj pasaĝeroj tamen en 2017 statistikis malpli rapidaj trajnoj *IC*, kiuj estis okupataj nur per 49,7%, tamen iom pli ol en la jaro 2016, kiam tiu ĉi indikilo atingis 48,3%. Nombro de pasaĝeroj en ĉiuj longdistancaj trajnoj *DB* en la jaro 2017 estis rekorda. La fervojo transportis en 2017 141 milionojn da personoj kontraŭ 139 milionoj en

2016, kio estis komenciĝo, kiun prezidantaro de la konzerno ne atendis. Post sukcesa starto de superekspresso sur fervojlinio *Berlino – Munkeno DB* decidiĝis, ekde decembro 2018 envicigi tage anstataŭ tri kvin grandrapidajn trajnojn *ICE*. Laŭ horara rapido 300 km/h tiel la grandrapidaj trajnoj *ICE* sur trajntraseo inter federacia ĉefurbo kaj bavara metropolo fariĝas signifa konkurento al flugkompanioj *Lufthansa* kaj *Easijet*. “*Fervojo devas sindediĉi entute por rezisto kaj forto koncerne kvalito kaj precizeco*”, akcentis *Lutz*, kiu memorigis, ke en la jaro 2017 estis akurateco de longdistancaj trajnkunligoj nur 78,5% kontraŭ starigita celo 81%. Li aldonis, ke celo por prezidantaro de la konzerno por la jaro 2018 estis atingi minimume 82% en precizeco de la trajnoj *ICE* kaj *IC*. “*Longatempa celo estas 85 procentoj*”, aldonis la ĉefo *DB*. *Lutz* anoncis ankaŭ novan programon kun la nomo “*Digitalaj trakoj de Germanio*”. Digitaligo pri 20% plialtigu kapaciton de la ĝisnuna fervojreto sen novaj konstruoj aŭ plivastigo de linioj. La celo estas forigi per tiu ĉi modernigo 160.000 da signalizaj aktivadoj kaj plimulton el 400.000 km da kabloj, ĉe kiu digitaligo maltrafos nek trakregejojn.

#### Germanio: **Nova tipo de pasaĝertrajnoj**

Kun ekvalido de fervoja horaro en decembro 2017 estis ĉe la kompanio *Deutsche Bahn (DB)* enkondukita nova kategorio de la trajnoj – *ECE (EuroCityExpress)*. Temas pri duopo de la trajnoj, trafikantaj inter *Frankfurt/Main* kaj *Milano*, kiu estas trakciata de trajnunuoj 610 *SBB*. Tiu ĉu trajnunuo respondas al kategorio A (kiel *TGV* kaj *ICE*), tial nomindiko *ECE*.  
(Laŭ *LOK Magazin*)

#### Aŭstrio – Italio: **Brennera pieda tunelo – ŝanco por fervojo**

Laŭ plano okazas konstrulaboroj en 55 km longa Brennera tunelo, kiu ĝis la jaro 2027 kunligos Italion kaj Aŭstrion kaj fariĝos tiel la plej longa subtera fervoja kunligo en la mondo. En Alpoj borata tunelo kunligos italan urbon *Fortezza* kun aŭstra *Innsbruck* kaj reduktos la kunligon al nuraj 25 minutoj ĉe ŝparo de plenaj 55 minutoj. Entuta buĝeto por konstruo de la tunelo atingas 4,4 miliardojn da Eŭroj, dum kio Italio devos elspezi pliajn 1,5 miliardojn por modernigi fervojan reton tiel, ke ĝi ebligu trafikadon de trajnoj 750 metrojn longaj kaj pezaj 1600 tunojn. Laŭ iniciatintoj de la projekto la Brennera tunelo helpas ĉe transiro al alia speco de trafiko. Provincoj *Trento* kaj *Bolzano* jam anoncis instigan planon por transiro de varoj el ŝoseo al fervojo.

#### Slovakio: **42 aktivaj fervojaj trafikistoj**

Laŭ informoj de *Železnice Slovenskej Republiky* (Fervojoj de Slovaka Respubliko – *ŽSR*) en la jaro 2017 al fervoja infrastrukturo havis aliron 53 trafikistoj, 42 el tiuj estis aktivaj. Kvin trafikistoj sian agadon finis same kiel unu trafikisto kun licenco por pasaĝera – kaj ankaŭ vartrafikoj. Trafikistoj sur linioj de *ŽSR* realigis entute 50.623.586 trajnkilometrojn (tkm), kio prezentas interjaran plikreskon pli ol 900.000 tkm. En vartrafiko estis atingitaj enspezoj 28,16 milionoj da Eŭroj ĉe trafikkapacito 15,55 milionoj da tkm.

#### Ukrainio: **Financa plano de Ukrainaj Fervojoj aprobita**

Kabineto de ministroj en Ukrainio aprobis financan planon de Ukrainaj Fervojoj (*UŽ*) por la jaro 2018. En rezulto de mastrumado aperu profito 709,879 milionoj *UAH*, tio signifas 21,324 milionoj da Eŭroj. En vartrafiko *UŽ* planas enspezon 71,965 milionojn *UAH*, kio estas pri 12.029 *UAH*, respektive pri ĉirkaŭ 20% pli multe ol en la jaro 2017.

Laŭ diversaj fontoj preparis: **Jindřich Tomášek**

# La 85-a Itala Kongreso de Esperanto en San Marino

(18-a – 25-a aŭgusto 2018)

Ĉi-foje la Itala Kongreso okazis ekster Italio, sed ĉirkaŭata de la teritorio de Italio en unu el la plej malnovaj ekzistantaj respublikoj de la mondo en San Marino, kiu troviĝas tute



*Palazzo Pubblico" en San Marino*

proksime al la konata riviero *Rimini*. Ĝi estis fondita jam en la jaro 301. Sur la kresto de la monto Titano leviĝas la tri fortikaĵoj videblaj jam de malproksime. Ni estis bonŝancaj kongresi en ĝia ĉefurbo San Marino. La kongreso fariĝis eksterordinara pro bonaj rilatoj kaj helpemo de la estroj de la Respubliko. La evento okazis en la prestiĝa kongresa centro *Kursaal*. Aliĝis 183 kongresanoj el 29 landoj, tamen kelkaj ne povis veni pro diversaj kialoj.

Sabate la 18-an de aŭgusto, post la alveno de la partoprenantoj, okazis Interkona vespero kun muziko kaj orientaj dancoj kaj la prezento de la dumsemajnaj ekskursoj fare de Paola Nigrelli.

La dimanĉan solenan inaŭguron prezidis Michela Lipari prezentante podianojn, inter kiuj ĉeestis gravaj gastoj. S-ino Fausta Morganti la eksa ministrino pri kulturo de San Marino kaj la dumviva reprezentanto de San Marino ĉe OSCE (Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo) en Vieno. Bonvenigis nin ankaŭ la itala ambasodoro en San

Marino s-ro Guido Cerboni. Poste Javier Alcalde prezentis la kongresan temon "Malgrandaj komunumoj, grandaj valoroj". (Dum la semajno okazis seminario pri tiu temo kun viglaj diskutoj). Sekvis bonvenigaj vortoj kaj salutoj de kelkaj aliaj Esperanto-organizaĵoj

(Junularo, KELI, ILEI, IFEF, LIBE), kaj po unu saluto el ĉiu kontinento. Poste la kursgvindantoj invitis la ĉeestantojn al siaj respektivaj Esperanto-kursoj. Amri Wandel prezentis la 35-an Sanmarinecan Universitatan Sesion (SUS 35) de AIS (Akademio Internacia de Sciencoj) fondita ĝuste en San Marino. Temis pri prelegoj: "Vivo ekstertera" prezentata de Amri mem, "Shakespeare kaj Hamlet" prezentata de Humphrey Tonkin, "Ĝenerala lingvistiko" prezentata de David Astori kaj "Bioenergetiko de la homa organismo" prezentata de Eva Boyadjieva.



*Unu el la tri fortikaĵoj sur la monto Titano*

En la enirhalo estis instalita ekspozicio pri Marina Michelotti, kiu en San Marino, fondis grupon kaj multe laboris por Esperanto. Alia ekspozicio pri Esperanto kaj pri la aŭtoro de la lingvo L.L. Zamenhof troviĝis en la unua etaĝo. Enhavoriĉa estis la libroservo, kie okazadis libroprezentadoj de diversaj aŭtoroj: Michela Lipari, Carlo Minnaja, Paola Tosato, Humphrey Tonkin. Al interesatoj pri filatelio estis proponata poŝta stampo kaj poŝtkartoj de San Marino jam pretaj por forsendo.



*Humphrey Tonkin prelegas pri Shakespeare*

Inter interesaj prelegoj estis tiu pri "Aliaj planlingvoj kaj aliaj grandaj valoroj", "Unu lingvo por ĉiuj, al ĉiu la propra lingvo", "Bona Espero en Brazilo", "Religiaj objektoj de naciaj minoritatoj en Bosnio kaj Hercegovino" "La fundamento de novbabelismo", "Enigmoj en Esperanto", "Rolo de Esperanto dum la hispana civila milito".

Kadre de la kongreso kunvenis la itala sekcio de ILEI, Asembleo de la itala instituto de Esperanto kaj ankaŭ gejunuloj havis sian propran programon plejparte vesperan kaj amuzan. Vendrede Elda Doerfer kun Michela Lipari prezentis la venontjaran Italan

Kongreson, kiu okazos en la urbo Triesto de la 24-a de aŭgusto ĝis la 31-a aŭgusto. Do, vi ĉiuj estas bonvenaj. Poste okazis resumo de la laboroj de la seminarioj, de AIS kaj de E-kursoj.

Neforgesebla travivaĵo estis invito al la itala ambasadejo, kie ni aŭskultis en belega ĝardeno klasik-muzikan koncerton de fluta kvaropo *Renaissance* kaj poste ni estis invititaj al festeno kun ŝaŭmvino, fruktoj kaj glaciaĵo.

Tre alloga estis la oferto de ekskursoj. La partoprenantoj povis ekkoni la urbon San Marino, ties unuan turon kaj promeni en pitoreskaj stratoj. En aliaj ekskursoj oni povis vidi la tutan Italion en miniaturoj, viziti urbojn *Rimini, Santarcangelo di Romagna, San Leo, Cesena kaj Cervia, Urbino kaj Gradara, Ravenna*. Tre interesa estis la Internacia muzeo pri ceramikaĵoj en *Faenza*, kie ni povis mem krei originalan vazon. En la muzeo de metiejoj ni ekkonis la historion de San Marino kaj la tiaman kamparanan vivon. Poste ni spertiĝis en preparado kaj bakado de speciala plata pano.

Dum vesperaj programoj regalis nin per muziko JoMo en publika parko, poste sekvis trink-manĝa nokto. En aliaj vesperoj tie prezentiĝis italaj kantistinoj Grazia Barboni kaj Chiara Raggi, kiuj ricevis merititan aplaŭdon. En la salono de *Grand Hotel* Mario Migliucci prezentis teatran spektaklon "Unua rigardo". La lastan vesperon tie prezentiĝis la duopo *Evocaré* - Patrizia Bossoni, kiu recitis poemojn en Esperanto kaj Giuseppe Serafino akompanis ŝin per piano. Ĉe la fino oni premiis fotojn el la fotokonkurso lanĉita de la gejunuloj. Tiel finiĝis la 85-a Itala Kongreso de Esperanto.

La ĉi-jara kongreso estis vere elstara kaj bonege organizita. Riĉa propono de altkvalitaj prelegoj, en kiu ĉiu povis elekti ion interesan por sia gusto, laŭ la titolo de la prelego aŭ laŭ la preleganto.

Dankegon al la organizintoj de la Itala Esperanto-Federacio, kiuj sub la gvido de Michela Lipari preparis neforgeseblan kulturen kaj turisman programon dum tiu ĉi memorinda kongreso.



*Amri Wandel prelegas*

**Liba Gabalda**

# La 26-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

(SALOU 29.9. - 6.10. 2018)

La kvinan kaj la lastan fojon ni ĝuis la Internacian Semajnon en Salou ĉe la Ora Marbordo. Salou estas grava turisma urbo situanta je 10 km sude de *Tarragona*. Ĝi estis fondita en la 6-a jarcento antaŭ Kristo kaj posedas kelkajn belajn plaĝojn. Proksime troviĝas granda amuz-parko *Port Aventura*.



Al la aranĝo aliĝis 100 geesperantistoj el 12 landoj. Ni loĝis en la ekstrema parto de la urbo en hotelo *Best Negresco*, kie en la jaro 1989 okazis la 41-a fervojista kongreso. Post la alveno kaj disdono de dokumentoj ni eksciis pri la semajna programo kaj la organizantoj parolis pri la estonto de la ŝatataj Semajnoj, kiuj ne plu okazos en la Kataluna parto de Hispanio.

*Marborda promenadejo en Salou*

La dimanĉan inaŭguron ĉeestis la urbestro de Salou, s-ro Pere Granados, kiu kore bonvenigis nin kaj deziris sukceson al la evento. Poste ni fotiĝis kun li ĉe la hotela naĝbaseno. Posttagmeze ni promenis laŭlonge de diversaj plaĝoj ĝis la centro de la urbo. Vespere okazis en gaja etoso interkonatiĝo kun ŝaŭmvino kaj kelkaj dolĉaĵoj kaj aliaj manĝaĵetoj. Bele kostumita hispana paro dancis *zarzuela* kaj Rosa Lopez muzik-ritme klakis per kastanjetoj.

Dum la Semajno sekvis programeroj, diskutrondoj pri diversaj temoj, interesaj prelegoj, aljuĝo de Premio Ada Sikorska, deklamado de poeziaĵoj, komuna kantado kaj videa prezento pri kataluna folkloro kaj kutimoj. Posttagmeze estis tempo por banado aŭ promonado en naturo ĉe la maro. Inter la prelegoj necesas substreki tiun de Pere Navarro Rosines pri: "Ĉu vi scias, ke nia manĝo venas de la suno?" Li klarigis la bioĥemian procezon en plantoj, alĝoj kaj kelkaj bakterioj, pri pigmentoj kaj ĝenerale pri fotosintezo. Ĉio estis ilustrita per multaj bildoj. Barbara Pietrzak el



*Partoprenantoj en la 26-a ES*

Pollando prelegis pri esperantista komunikado, pri famaj esperantistoj, pri klopodoj ĉe Unesko kaj aliaj interesaĵoj el Esperantio. Zita Blaust el Danio parolis pri siaj spertoj kaj impresoj dum la 12-a Internacia Himalaja Renkontiĝo en Nepalo kaj pri la hinda virino *Sindutaj Sankal*. Javier Alcalde prelegis kaj diskutis pri pacismo, pri la roloj de esperantistoj dum la granda milito (1914-1918), pri la influo de la Esperanto-movado. Lia prelego titoliĝis "Antaŭ unu jarcento - Esperanto kaj la unua mondmilito". Abel

Montagut prezentis "La poemo de Utnoa kaj la Diluvo". Luz Vázquez gvidis rondon pri kulturtemoj, esencaj trajtoj de Esperanto-kulturo. Dalia Pileckienė parolis pri stereotipa pensmaniero en nia vivo elpsikologia vidpunkto. En kelkaj grupoj ni plenumis diversajn taskojn. Ángel Argilos gvidis rondon pri deklamado de poezio en Esperanto. La ĉi-jara Premio Ada Sikorska estis aljuĝita al Barbara Pietrzak, kiu multe laboras por Esperanto. Ŝi persone konis Ada-n kaj ili komune laboris por Esperanto.



*Barbara Pietrzak prelegas*

Kiel lastjare ankaŭ ĉi-foje ni ĝuis "Peĉakuĉon". Ĝi estas serio da bildoj kun komentarioj de la aŭtoroj. Ni eksciis pri tornilo, pri irlanda historio kaj pri Patriko, pri vojaĝo laŭ usona vojo 66-a,

pri radioaktiveco kaj atomoj. Ni spektis kastelojn en Dordonjo kaj tridimensiajn bildojn el Koreio.

Okazis duontaga ekskurso al la proksima urbo *Reus*, kie ni promenis ĝis la centra parto de la urbo. Tie ni povis vidi kaj admiri de ekstere la *Casa Navás*. Poste ni vizitis "Gaŭdi Centron" spektante filmon kaj diversajn eksponaĵojn. En *Centre de lectura* ni vizitis ampleksan bibliotekon kun multaj libroj kaj galerion de bildoj. La tuttaga ekskurso direktiĝis al apudmara urbeto *Sitges*. Tie ni vizitis muzeojn *Maricel* kaj *Cau Ferrat* (domo-

ateliero de la kataluna verkisto kaj pentristo *Santiago Rusiñol*, kiu tie vivis). Ekde la fino de la 18-a jarcento ĝis la komenco de la 19-a jarcento tie establiĝis konstanta komercado kun amerikaj kolonioj. Impona estas la preĝejo Sankta Bartolomeo kaj Sankta Tekla el la deksepa jarcento. En la urbocentro ni promenis tra mallarĝaj pavimitaj stratetoj kaj admiris kelkajn luksajn domojn. La urbon oni nomas hispana *Saint Tropez*. Ekde la jaro 1967 ĉi tie regule okazas internaciaj film-festivaloj. En *Sitges* troviĝas domo *Bacardi* transformita en muzeon, kie oni povas gustumi la produktojn *Bacardi*. En la jaro 1814 tie naskiĝis *Facundo Bacardí Massó*, kiu en la jaro 1830 migris al Kubo kaj tie estis inventinta la faman rumon. *Bacardi* estas entrepreno de alkoholaĵoj, kiu ekestis en *Santiago de Cuba* en 1862. Ĝi estas unu el la plej vendataj alkoholaĵoj en la mondo.



*Belega marbordo en Salou*

Denove kaj lastfoje ni kun entuziasmo aŭskultis "habaneran" muzikgrupon *Montjüic* dum la jaŭda vespero, kie ne mankis dolĉa ruma trinkaĵo *Cremat*. Vendrede ni adiaŭis per kantado gvidata de Jeanne Draime kaj Martine Demouy. Finiĝis agrabla 26-a Internacia Semajno, restas nur belaj rememoroj. En Andaluzio ekestos nova Semajno, organizos ĝin spertaj malaganoj.

Denove kaj lastfoje ni kun entuziasmo aŭskultis "habaneran" muzikgrupon *Montjüic* dum la jaŭda vespero, kie ne mankis dolĉa ruma trinkaĵo *Cremat*. Vendrede ni adiaŭis per kantado gvidata de Jeanne Draime kaj Martine Demouy.

Finiĝis agrabla 26-a Internacia Semajno, restas nur belaj rememoroj.

En Andaluzio ekestos nova Semajno, organizos ĝin spertaj malaganoj.

**Liba Gabalda**

## GRAVAJ „TAGOJ”

La jaro havas 365 tagojn. En tiuj tagoj estas semajnaj tagoj, labortagoj, festotagoj kaj ripoztagoj. Sed ĉiu jaro havas kelkajn specialajn kaj gravajn tagojn, kiujn decas soleni aŭ primemori. Ĉiuj landoj, organizaĵoj, klikoj havas specialajn tagojn, kiujn ili solenas. Tiel ekzemple la Zamenhof Tago en la 15-an de decembro, kiun la esperantistoj solenas ĉiujare. Sed ekzistas tiuj tagoj, kiujn ĉie en la mondo oni rememoras eĉ solenas. El tiuj tagoj mi prezentas kelkajn – laŭ mi la plej gravajn – ĉar tiujn tagojn ankaŭ la esperantistoj ĉiujare primemoras.

### **Internacia Tago de la Gepatra Lingvo.**

La *21-an de februaro* estas la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, kion en la 17-a de novembro 1999 proklamis Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri edukado, scienco kaj kulturo). Oni elektis la daton (21. 02) memore de la pafmortigo en la Universitato de Dako en Bangladeŝo en 21-an de februaro 1952, kiam la studentoj manifestaciis por la rekono de la bengala lingvo kiel gepatra lingvo. En 2007 la Unuiĝintaj Nacioj (UN) alvokis la membroŝtatojn por antaŭenpuŝi la konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la popoloj de la mondo. En 2016 UN adoptis rezolucion proklamante la jaron 2019 la „Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj”. La forumo de UN komunikis, ke 40%-j de la ĉirkaŭ 6700 lingvoj parolataj en la mondo estas minacataj je malapero. La esperantistoj volas neniun lingvon malaperigi, eĉ ni volas ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj regu lingva justeco en la interkomunikado. Ĉi-cele de multaj jaroj la Universala Esperanto-Asocio (UEA) solene kunfestas ĉi tiun tagon. La kialo estas simpla, ĉar malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj interesoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj. Malantaŭ Esperanto estas nur bonvolaj homoj el plej diversaj popoloj, nacioj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj en paco inter ĉiuj popoloj. La uzo de la lingvo Esperanto en internacia komunikado realigas lingvan egalrajtecon kaj helpas ĉiujn pluvivigi sian lingvon, inter alie ankaŭ la indiĝenajn lingvojn.

### **Internacia Tago de Paco.**

La *21-an de septembro* estas la Internacia Tago de Paco, festata tra la mondo sub aŭspicio de UN. Tiu ĉi tago estas okazo por memori la gravecon de paco, la fruktojn de paca vivo, kaj la fakton, ke multaj homoj tra la mondo vivas en stato malpaca en kiu ilia bonfarto, ilia libereco kaj eĉ la propraj vivoj estas konstante minacataj kaj kompromitataj. Okaze de tiu tago oni aparte memoris la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj akceptitan antaŭ 70 jaroj kiel fundamenton de la postmilita monda ordo. Bedaŭrinde la homoj ofte forgesas, ke ĉiuj rajtas vivi en paco, kiun la Internacia Komunumo antaŭ 70 jaroj solene deklaris. UEA povas fiere noti, ke ĝia statuto klare aludas al la Deklaracio notante, ke „Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj tiaj kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj”.

### **Internacia Tago de Traduko.**

En 2017 UN aprobis signifan rezolucion rilate al uzadon de lingvoj en tiu organizaĵo. Tiu rezolucio estis direktita al tradukado. Ĝi laŭdis la profesion tradukadon kaj konstatis ke ĝi ludas gravan rolon en apogado de la celoj kaj principoj de la Ĉarto de UN, kuniganta la naciojn, faciligante dialogadon, interkomprenon kaj kunlaboron, kontribuante al evoluigo kaj fortigo de monda paco kaj sekureco. La UN deklaris la *30-an de septembro*

la Internacian Tagon de Tradukado, kiam oni festu la rolon de tradukistoj. En tiu interrilato UEA pledis ĉe UN la valorigon de lingva diverseco kaj konstatis, ke la klara rekono de la graveco de tradukado kaj interpretado en la laboro de UN estas signifa paŝo antaŭen. UEA rekomendas al UN, ke formulante estontan lingvan politikon, UN ekzameni ĉiujn eblecojn por faciligi la interkompreniĝon en kaj ekster la organizaĵo, konsiderante la rolon kiun en Internacia Lingvo Esperanto povus ludi kiel ilon por larĝigi ilian efikecon per pli vasta multlingvismo. Helpe de la instigo de UEA oni fondis antaŭ kelkaj jaroj Studgrupon pri Lingvoj kaj UN, en kiu membras funkciuloj de UN kaj fakuloj pri lingva politiko, inkluzive de esperantistoj. Tiu grupo estas forumo por pridiskuti lingvajn demandojn. Ni esperantistoj festas ĉiujare pri lingvaj diferencoj, la tradukistoj kaj interpretistoj, la kreskon de konscio flanke de UN pri la lingva diverseco.

### **Internacia Tago de Ne-Perforto.**

La *2-an de oktobro* estas regule festata la Internacia Tago de Ne-Perforto laŭ deklaro de UN. En tiu tago ni memoras la elstarajn atingojn de tiuj kiuj per apliko de ne-perforto ŝanĝis la proprajn sociojn laŭ la direkto de justeco kaj egaleco. Mahatma Gandhi nomis ne-perforton „la plej granda potenco je la dispono de la homaro”. UEA aparte rekonas la gravecon de lingva komunikado kiel instrumento de ne-perforto. Per sia kapablo paroli kaj skribi, la homo povas persvadi, insisti, rezoni kaj ĉion fari por eviti perfortan konfrontiĝon. Tio eblas nur tiam, se ambaŭ flankoj parolas la saman lingvon. Tro ofte la komunikado kolapsas pro malsameco de lingvoj, aŭ pro la nekapablo de parolantoj de malsamaj lingvoj adekvate transporti tiujn diferencojn. La Internacia Lingvo Esperanto estis kreita por transporti la diferencojn inter lingvoj, formante bazon por ne-perforta komunikado kaj la antaŭenigon de interkompreniĝo. La statuto de UEA asertas kaj deklaras sian sindediĉon pri kunlaboro kun UN al kreo de pli paca kaj pli komprenema.

### **Internacia Tago por Toleremo.**

En 1996, okaze de la 50-a datreveno de Unesko, la Ĝenerala Asembleo de UN alvokis al membraj ŝtatoj, ke ili marku je la *16-an de novembro* Internacian Tagon por Toleremo. La Ĝenerala Direktoro de Unesko difinis, ke „La toleremo estas humana ago, kiun ĉiu el ni devas nutri kaj praktiki en la propra vivo ĉiutage por jubili pri la diverseco, kiu fortigas nin, kaj la valoroj, kiuj nin unuigas”. La toleremo certigas en la kadro de la esperantista movado komunajn valorojn, kiuj estas espero en konstruado de paca mondo, harmonia kunvivado inter la popoloj, respekto al kultura diverseco, solidareco trans la limoj. Nuntempe la toleremo pli multe gravas ol antaŭe, ĉar en ĉi tiu epoko de kreskanta kaj perforta ekstremismo kaj larĝiĝantaj konfliktoj karakterizas fundamentan malatenton pri la homa vivraĵo. La UEA alvokis la esperantistaron – fakte al ĉiuj homoj de bona volo – aserti sian sindediĉon al toleremo kaj interkompreniĝo, kaj fari ĉion eblan por forigi maltoleron kaj antaŭjuĝon, subtenante rektan kaj senperan komunikadon inter la popoloj de la mondo.

### **Tago de Homaj Rajtoj.**

La *10-an de decembro 2018* estis la Tago de Homaj Rajtoj, kaj festadoj de la 70-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, akceptita je tiu dato en 1948. La UN agadis kaj konstante, persiste kaj longdaŭre agadas por la defendo de la homaj rajtoj tra la mondo, kaj atentigas ke – pli ol iam ajn antaŭe - la popoloj de la mondo bezonas la Deklaracion kaj la principojn kiujn ĝi entenas. Ĉie la homaro frontas diskriminacion – interalie diskriminacion surbaze de la lingvouzadon de perforto anstataŭ paca dialogo, kaj forgesemon antaŭ la lecionoj de la historio. UEA deklaras sian solidarecon kun la principoj de homaj rajtoj kaj kun UN en ties strebado realigi tiujn principojn. UEA

dekomence laboris por la ideoj de homa egaleco kaj tutmonda interkompreniĝo por atingi pli justan kaj pacan mondon, kaj konfirmas sian plenan subtenon de la idealoj de la Universala Deklaracio. UEA enskribis respekton al la homaj rajtoj en sia statuto kiel esencan kondiĉon por sia agado. Nuntempe UEA aktivas por dissendi informojn pri homaj rajtoj en pli ol 120 landoj. Homrajta tago proksime koincidas kun la naskiĝtago de Zamenhof (la 15-an de decembro) la iniciatinto de Esperanto, kiu dediĉis sian vivon al la interfratiĝo de la homaro. Zamenhof asertis en 1905, ke „Absolute justeco, egaleco kaj frateco inter la popoloj en la praktiko estas plene ebla”. Li deklaris en 1906, ke „ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj, kaj en sia familia vivo ĉiu homo havas plenan naturan kaj ne disputeblan rajton paroli kian lingvon aŭ dialekton li volas kaj konfesi kian religion li volas”. Pro tio li rekomendis Esperanton kiel internacian lingvon por la tuta homaro. UEA proponis traduki la Deklaracion al la gepatra lingvo al ĉiuj landaj asocioj de UEA, kaj diskonigi tion al la loĝantaro.

István Gulyás

## **NEKROLOGO**

### **ÉVA FARKAS TATÁR (1924 – 2018)**

La hungara esperantistaro havas grandan perdon, ĉar mortis en sia 94-a jaraĝo Éva Farkas Tatár. La perdo tuŝis la tutajn esperantistojn en la mondo, ĉar ŝi estis konata en Eŭropo, eĉ en la tuta mondo. Ŝia karaktero, eminenta lingvoscio, inteligenteco kaj helpopreto estis nepereontaj proprecoj en nia memoro. Ŝi multfoje prelegis en nia iama Esperanto-klubo, ŝi estis la interpretisto en la kulturaj programoj okaze de en Hungario organizitaj IFEF-kongresoj. Ŝi instruis multajn hungarajn fervojistajn esperantistojn por ĝuste akcenti kaj paroli la lingvon Esperanto. Ŝi taksis nian fakan revuon HFM signife kaj grave, kaj dum la lingvoinstruado ŝi uzis tiujn artikolojn por traduki, analizi la gramatikajn solvojn ktp. Ŝi estis nia „Onjo Éva”, pri kiu ni rememoras kun sinceraj emocioj. Ripozu en paco!

Ni metis ĉi tien ŝian konfeson pri la Esperanto en sia vivo:

#### **Kiel ŝi mem skribas pri sia vivo?**

En la knabina gimnazio en mia aĝo ni lernis ok jarojn la germanan, ses jarojn la francan kaj kvar jarojn la latinan lingvon. Mi trapasis la abiturientan ekzamenon en 1942 kaj poste mi deziris studi en la universitato de Budapeŝto. Sed baldaŭ mi renkontis simpatian, inteligentan, reformitan pastoron kaj post unu jaro ni geedziĝis. Sekvan jaron naskiĝis mia unua filino – tiutempe oni jam bombardadis Budapeŝton. En 1948 mia edzo estis komisiita organizi novan komunumon en la mezo de Budapeŝto en la densa sepa distrikto. En ĉi tiu laboro ankaŭ mi estis tre okupita, krome en 1950 naskiĝis mia kvina filino, do longtempe mi ne havis tempon kaj forton okupiĝi pri io alia ol miaj devoj. Sed tamen kelkfoje mi revis pri lingvoj kaj mi legis france kaj germane por ne forgesi ĉion.

## Kiel mi eklernis Esperanton

En 1961 okazis, ke mi renkontis iun maljunan, entuziasman esperantiston, kiu pruntedonis al mi malnovan Esperanto-lernolibron. Enrigardante mi ekvidis la latinajn prepoziciojn kaj kaptis min la nostalgio. Mi tralegis pli atente la libron kaj mi estis ravita pri la genieco de Zamenhof, pri la spiritaj solvoj en la gramatiko kaj mi vidis ke tiu lingvo estas io ellernebla. Tiam mi aĉetis la tiaman plej modernan lernolibron de Julio Baghy kaj mi „finlernis” ĝin. Mi neniam havis tempon regule viziti lingvokurson, sed eble ĝi estis mia bonŝanco, ĉar tiel mi sekvis nur fidele la konsilojn de Julio Baghy neniu alia influis min. Mi finstudis la libron en 1962 kaj iu proponis al mi partopreni Universalan Kongreson, kiu tiujare estis en Kopenhago. En ĉi tiu jaro oni enkondukis en nia lando la t.n. „turistan pasporton” kaj tio plifaciligis al ni vojaĝi eksterlanden. Mi eksciis, ke antaŭan semajnon estos kristana kongreso de KELI en la sveda urbeto Srandbaden kaj mi aliĝis al ambaŭ. Ĉi tiuj renkontiĝoj kun esperantistoj el la tuta mondo estis decidaj por mia tuta vivo.

Antaŭ mi en la mikrofonon parolis brazilano, italo, madagaskarano, nederlandano, norvego, svedo kaj mi ĉion komprenis – kaj ĉirkaŭ mi la poloj, francoj kaj germanoj komprenis la samon – eĉ hodiaŭ mi sentas tiun tremon, kiu kaptis min pro tiu miraklo. Ĉi tiu profunda sento helpis min en la fortostreĉoj kiam mi en supergrada ekzameno parolis antaŭ la pretendema d-ro István Szerdahelyi esperantlingve pri gramatiko aŭ pri movadhistorio kaj literaturo. Do, mia deziro pri lingvoj, kiu ŝajnis ĉesi pro la milito kaj pro la familiaj devoj, tiel plenumiĝis. Komprenable pri ĉi tiu mia ĝojo kaj malkovro mi tre volonte parolis al ĉiuj. Tiel komenciĝis mia instruista kariero, kun granda entuziasmo mi volonte transdonis ĉion, kion mi sciis kaj malkovris.

## Post la unua UK en Kopenhago

Post mia entuziasma raporto pri la unua UK multaj konatoj deziris lerni Esperanton kaj mi invitis el la Budapeŝta Esperanto-klubo Egressy la maljunan sinjoron d-ron Réthelyi, pri kiu mi aŭdis, ke li instruis kiel Cseh-instruisto ankaŭ eksterlande. Mi estis lia helpanto kaj mi ĝuis, kiel li ĉion klarigas laŭeble montrante la objektojn kaj la movojn. Jam tiutempe mi pensis pri tio, ke la ŝercetoj kaj ekzemploj estas iom malmodernaj, kaj en la kapo jam kolektiĝis novaj ideoj por la sama instrumentado. Kiam en 1964 mi povis ĉeesti la kongreson en Hago, mi feliĉege partoprenis la seminarion de Andreo Cseh, kaj aĉetis lian pakaĵon de instrumaterialoj. En la supergrada kurso de d-ro Szerdahelyi ankaŭ teorie ni okupiĝis pri diversaj instrumentadoj kaj tiel konscie mi elektis la vojon de Andreo Cseh uzante ankaŭ tiun liberecon, kiun li donas en siaj konsiloj. Mi kuraĝis uzi modernajn ekzemplojn, novajn objektojn sur tiu bazo, kiun li tiel konsilas: „amu la objekton, kiun vi instruas, kaj amu la lernantojn, kiuj sidas antaŭ vi (kaj tiam ĉiuj miaj konsiloj estos superflujaj)”. Tiel mi komprenis ankaŭ tion, ke por hungaraj oreloj ne estas problemo la akuzativo. Ni rekonas la transitivajn verbojn, sed despli granda problemo estas la verbo havi, kiun nature uzas multaj aliaj eŭropanoj. Do tiel mi ellernis kiel mi devas esti „elasta”. Nu tiel mi fariĝis jam iom konata kiel instruisto, kiam oni organizis la UK-n en Varna. Kiam el Hago de la Esperanto Instituto oni interesiĝis pri ebla Cseh-instruisto, s-ano Aleksijev rekomendis min. Loka bulgara instruisto gvidis la seminarion kaj mi la lingvokurson. Tio estis senpaga, la alia ne. Neniam antaŭe mi devis ekstari antaŭ pli ol 300 homoj. Sed en bona etoso gaje kaj tre aktive ni estis kune. Tio iris bone ĉiutage, kaj la reprezentanto de la Instituto, kiu kontrolis ĉiujn horojn fine jam invitis min, ke ankaŭ en la sekva jaro en UK en Lucerno mi prezentu instruadon laŭ Cseh-metodo. La samon mi faris en 1982 en Antverpeno kaj en 1986 en Pekino. En Finnlando oni organizis somerajn Esperanto-kursojn, do mi instruis tie eĉ kvinfoje. Trifoje mi instruis en Bulgaraj tendaroj. Mi estis invitita ankaŭ al Grésillon kaj al la sudfranca urbo Sete. Ĉie estis granda avantaĝo mia Cseh-bazo, ke ne estis problemo se miaj kursanoj apartenis al diversaj nacioj. Foje

okazis en iu UK, ke laŭ la programo mi kun kolektiĝanta grupo iris en la salonon destinitan por nia kurso kaj por iu miskompreno tie ne estis nigra tabulo, kretoj ktp. Ni tion konstatis kaj mi komencis diri al la homoj kelkajn paŝojn de la komenco. Subite iu sinjoro eksaltis kaj kriis: „ĉu vi volas prezenti Cseh-metodon sen nigra tabulo kaj koloraj kretoj?“. Mi iom surpriziĝis, sed venis en mian kapon ĉi tiu frazo: „vidu mi tion lernis de Andreo Cseh, ke inter ĉiuj cirkonstancoj ni povas instrui Esperanton!“. Dum mia longa vivo mi vere kelkfoje estis inter strangaj cirkonstancoj, sed la konsilo de Andreo Cseh funkciis: „se vi amas vian objekton kaj viajn lernantojn, vi sukcesos“.

## **Esperanto en la familio**

En mia granda familio plej bone estis ke mia edzo akceptis ĉi tiun mian „ŝatokupon“, kiu poste fariĝis vera profesio. Li, kiu konis plurajn lingvojn, facile komprenis miajn gazetojn kaj artikolojn, kaj se necesis, li eĉ per telefone bone povis uzi Esperanton kaj afable li povis interparoli kun miaj geamikoj, kiuj ĉiam pli ofte aperis en nia hejmo. Ni pasigis 56 jarojn kune, el tiuj 51 en la sama komunumo. Li aktive partoprenis kun mi en du kristanaj kongresoj, kaj en la solena ekumena diservo okaze de la UK en Budapeŝto en 1983 li predikis (eminente) en la plen-plena Baziliko Sankta Stefano.

Miaj filinoj siatempe multe ĝuis, ke panjo tiel serioze lernas kaj ekzameniĝas, ili kolektis iun bazan konon, sed ne multe okupiĝis pri tio, poste ankaŭ ili frue edziniĝis kaj estis okupataj pri siaj infanoj kaj profesiaj laboroj. Sed inter la genepoj jam estas tri nepinoj kaj unu nepo, kiuj eminente scias nian lingvon, kaj unu, kiu ankaŭ aktivadas en KELI.

Mi partoprenis 16 Universalajn Kongresojn el kiuj en 1966 kaj en 1983 mi aktivadis ĉar ili estis en Budapeŝto. KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) kaj IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) ĉiujare organizas kongresojn, el kiuj ĉiuj dua estas komuna, do ekumena. En tiuj mi aktive partoprenas jam de la jaro 1986, kaj kelkajn ni kun gefratoj, helpantoj en Hungario.

## **Esperanto Radioelsendoj en Budapeŝto (1966-1969, 1989-1995)**

En la Budapeŝta Radio imponaj esperantlingvaj programoj estis de printempo 1966 por antaŭprepari la UK kaj tio daŭris plu tri jarojn, ĉiuvespere kvaronhoron. Poste oni ne plu metis en la programon Esperanto-dissendon ĝis la unua de oktobro 1989, kiam denove ni povis komenci esperante saluti niajn karajn aŭskultantojn, unufoje semajne. Nia elsendotempo poste kreskis de dek minutoj ĝis duonhoron. Mi povis prezenti intervjuojn kun eminentaj esperantistoj, prelegetojn, informojn eĉ kantojn el nia internacia trezorejo. Sed tiuj elsendoj estis nur por hungaroj, ses jarojn daŭris kaj ĉesis denove sen iu alia klarigo ol „ni devas ŝpari“.


Mi neniam kalkulis en kiom da lingvokursoj mi instruis Esperanton, sed vere en multaj. Ankaŭ eksterlanden oni ofte invitis min, tiel mi estis en Bulgario, Finnlando, Francio kaj en kelkaj UK-j mi prezentis la Cseh-metodan instruadon. Nun de multaj jaroj mi jam ne entreprenas instrui en grupoj, sed individue mi tre volonte okupiĝas pri instruado kaj kiel mi scias, neniu el miaj gelernantoj malsukcesis.

Kiam mi ekstaras antaŭ la mondmapo kaj mi rememoras pri lokoj, kiujn mi povis viziti kaj tie lasi iun pozitivan spuron, estas mirinda sento. Kaj kiam mi pripensas, ke eĉ tie, kie mi neniam estis, vivas homoj al kiuj mi povis prezenti ion el tiu nobla ideo, kiun nia Majstro heredigis al ni, mi simple estas dankema. Mi deziras al ĉiuj, kiuj komencis okupiĝi pri Esperanto, ke ili ankaŭ fariĝu esperantistoj kaj trasentu la gravan signifon, ke ni estas anoj de unu granda familio.

*Éva Farkas-Tatár por la Panteono, decembro 2011.*

**HEFA**

## TRAJNVOJAĜADO EN BARATO (HINDIO)



La aŭtoro de tiu ĉi artikolo jam plurfoje vizitis Hindion. Nun ŝi raportas pri la lasta kaj tre interesa sed vere tro laciga trajnvojaĝo en Barato (Hindio).

Kelkaj frazoj pri la hinda fervojo: La historio pri tiu fervojo komencis en 1853, kiam oni konstruis entute 34 km-jn da fervojlinio. Ĝis la jaro 1900 jam konstruiĝis 38 mil km-j fervojlinioj, kaj nuntempe jam funkcias pli ol 63,7 mil km-j da fervojlinio, el kio pli ol 54 mil km-j estas larĝŝpura fervojo (1676 mm-j), 7,2 mil km-j estas mallarĝŝpuraj (1000 mm-j) kaj 2,5 mil km-j havas 762 resp. 610 mm-jn. En la fervojreto troveblas 6900 fervojstacioj, kaj trafikis ĉiutage pli ol 11000 trajnoj kun 12,5 milionoj da pasaĝeroj.

En la pli ol unu miliarda loĝanta Hindio la plej grava kaj uzata trafikilo estas la fervojo. Ĉiutage

trafikas per trajno grandega amaso da loĝantoj al la laborejo kaj lernejo, kaj laŭ la tradicio multaj familioj vojaĝas al la parencoj ĉiujare multfoje en la tuta lando. La biletoj por la trajno estas iomete malmultekostaj, sed por la grandrapidaj kaj pli komfortaj trajnoj estas multekostaj. Ankaŭ la vartrafiko estas eksterordinara laŭ niaj spertoj, ĉar ĉiujare pli ol unu miliardo da tunoj trafikis en Hindio per trajno. La fervojo havas 11 mil lokomotivojn, 67 mil pasaĝervagonojn kaj 245 mil varvagonojn. La hinda fervojo estas konsternite grandioza kaj kompleksa organizaĵo, kiu okupas pli ol 1,5



milionojn da homoj.

Sur la kajo en la stacidomo

Nun sekvas la raporto:

Aŭtune ni spertis kun grupo de nepalaj esperantistoj interesan trajnvojaĝon en Barato. De urbo Gorakhpur, kiu troviĝas en la norda parto de Barato ni vojaĝis ĝis la sudo al urbo



Simioj sur la kajo

Chennai. La vojaĝo konsistis el tri etapoj: Gorakhpur – Chennai, Chennai – Kolkata kaj Kolkata – New Jalpaguri. La plej vasta fervojreto en Azio troviĝas en Barato. Preskaŭ la tuta lando havas alireblecon al la fervojo, escepte de kelkaj montaraj regionoj en la nordo kaj nordoriento. Ĉirkaŭ 11000 trajnoj cirkulas ĉiutage tra la lando. La veturado per trajno ne multe kostas en Barato. La stacidomo de urbo Gorakhpur tre imponas kaj posedas la plej longan fervojan kajon en la mondo pri kio oni prave fieras. La kajo mezuras 1366 metrojn. Sur la reloj laŭ

unu kajo povas samtempe halti du trajnoj, ĉiu el ili havante ĝis 26 vagonojn. Estas konate, ke la barataj trajnoj longas kelkcent metrojn.



*Plenŝtopa trajno en la norda parto de Hindio*

ventumiloj. Lumoj kaj aliaj elektroinstalaĵoj foje ne funkcias. Necesejo estas tre malpura, apude en la koridoro estas lavujo sen sapo, super ĝi pendas spegulo. Fojfoje ankaŭ venas purigistoj dungitaj de la fervojkompanio. Sed ankaŭ okazas, ke venas junaj knaboj por purigi plankon postulante la monon.

Dum la vojaĝo la eksteraj pordoj estas konstante malfermitaj ambaŭflanke, kaj la homoj staras aŭ sidas ĉe ili. Iuj ankaŭ alsaltas veturantan trajnon. En la trajno eblas mendi tagmeze kaj vespere manĝon, kiun oni pretigas en unu de la vagonoj. Post la konsumado la malplenaj skatoloj kaj boteloj estas ĵetataj tra la fenestro. Laŭvoje amasiĝas rubaĵoj. En la trajno mem ne estas ujoj por meti restaĵojn, do la homoj ĉion ĵetas eksteren. Rubujoj troviĝas kutime sur la kajo. Tra la vagonoj senĉese pasadas vendistoj, kiuj proponas kafon, teon, akvon, manĝaĵojn, fruktojn, nuksojn, ŝtofojn, librojn, gazetojn, infanludilojn kaj multajn aliajn utilajn aŭ neutilajn aĵojn.

La pasaĝertrajno konsistas el diversaj kategorioj de vagonoj. Ni elektis la plej simplan kaj malmultekostan kuŝvagonon. Unua impresio ne tro allogas. Malgrandaj fenestroj kun kradoj elvokas vagonojn por brutaro. Dum la tago oni sidas kaj nur vespere oni levas mezan kuŝlitan. Oni povas ankaŭ kuŝi dumtage en la supra parto. Tiuspeca trajno ne disponas pri litaĵoj, kelkaj homoj mem alportas kovrilon. Estas tri niveloj de kuŝlokoj, ĉe la koridoro

kontraŭ la fenestroj estas nur du kuŝlokoj. Sur la plafono estas fiksitaj grandegaj



*La zebuoj havas avantaĝon sur la kajo*



*Kaproj inter la trakoj*

De tempo al tempo aperas almuzuloj kaj iuj religiuloj. En la stacioj, kie la trajno haltas, atendas vendistoj kaj proponas ĉefe trinkaĵojn kaj diversajn manĝaĵojn foje pretigataj antaŭ la okuloj de la vojaĝanto. Plej okulfrapas homoj kaj bestoj libere promenantaj inter la reloj. Sur la kajoj ofte promenas hundoj, kaproj, porkoj kaj eĉ simioj. Apud nia trajno trankvile paŝadis zebuo rigardante la pasaĝerojn.

Entute ni trajnvojaĝis 4334 kilometrojn kaj en la trajno ni pasigis proksimume 110 horojn kun neforgeseblaj memoraĵoj.

**Liba Gabalda**



**La 71-a kongreso de IFEF okazos de la 03-a ĝis la 09-a de majo 2019 en la hispana urbo Malago  
Ankoraŭ oni povas aliĝi**